

La Ondo de Esperanto

Internacia sendependa magazino en Esperanto. 2019. №1



Bonan Jaron 2019!

Internacia sendependa magazino en Esperanto. 2019. №1 (291)

Ekde 2017 *La Ondo de Esperanto* aperas nur elektronike, kiel bitgazeto laŭ la normoj “pdf” kaj “ePub”.

Aperas ĉiumonate, krom aŭgusto. Senpaga literatura suplemento jarfine.

Fondita en 1909 de Aleksandr Saĥarov. Refondita en 1991.

Eldonas kaj administras: Halina Gorecka

Redaktas: Aleksander Korĵenkov

Konstantaj kunlaborantoj: Paweł Fischer-Kotowski (vicredaktoro), Peter Baláž, István Ertl, Irina Gonĉarova, Dafydd ab Iago, Wolfgang Kirschstein, Aleksej Korĵenkov, Floréal Martorell, Valentin Melnikov, Paŭlo Moĵajevo, Sergio Pokrovskij

Poŝta adreso: RU-236039 Kaliningrad, ab. ja. 1205, Ruslando

Retpoŝtaj adresoj: sezonoj@kanet.ru, sezonoj@yahoo.com

Retejoj: <http://esperanto-ondo.ru>, <http://sezonoj.ru>

Perantoj. Vidu la liston sur p. 71-72.

Abontarifo por 2019

Internacia eŭra tarifo: 15 eŭroj

Internacia dolara tarifo: 17 usonaj dolaroj

Pollando: 60 zlotoj

Ruslando kaj Belarusio: 850 ruslandaj rubloj

Anonctarifo

Plena paĝo: 50 eŭroj (3000 ruslandaj rubloj)

Duona paĝo: 30 eŭroj (1800 rubloj)

Kvarona paĝo: 15 eŭroj (900 rubloj)

Okona paĝo: 10 eŭroj (600 rubloj)

Triona rabato pro ripeto.

Donacoj: La donacoj estas danke akceptataj ĉe la redakcia adreso (ruslandaj rubloj) aŭ ĉe nia UEA-konto “avko-u” ĉe UEA.

Recenzoj: Bonvolu sendi du ekzemplerojn de la recenzota libro, kasedo, disko k. a. al la redakcia adreso.

Represo: Oni povas represi tekstojn kaj bildojn nur kun permeso de la redakcio aŭ de la aŭtoro kaj kun indiko de la fonto.

“La Ondo de Esperanto” (Волна эсперанто). 2019, №1 (291).

Ежемесячный журнал на языке эсперанто.

Журнал зарегистрирован Министерством Российской Федерации по делам печати, телерадиовещания и средств массовых коммуникаций. Свидетельство о регистрации ПИ №77-9723.

Учредитель и издатель: Горецкая Г. Р. Редактор: Корженков А. В.

Подписано в печать: 1 января 2019 г.

Bazaj informoj pri <i>La Ondo de Esperanto</i>	2
En ĉi tiu numero	3
Temo	5
Paweł Fischer-Kotowski. Hori Jasuo: La Esperantisto de la Jaro 2018.....	6
Elektokomisiono de La Esperantisto de la Jaro 2018	7
Tribuno	8
Niaj atingoj kaj malsukcesoj en 2018 (Peter Baláž, Anna Bartek, Ulrich Brandenburg, Renato Corsetti, Mark Fettes, Paweł Fischer-Kotowski, Albert Stalin Tancinco Garrido, Mireille Grosjean, Trezoro Huang Yinbao, Dennis Keefe, Katalin Kováts, Vinko Markovo, Francesco Maurelli, Giorgio Silfer, Humphrey Tonkin, José Antonio Vergara, Zhang Ping, Łukasz Żebrowski)	9
Eventoj	19
Povilas Jegorovas. Kongreso en Kaŭno: renkonte al la centjariĝo de LEA	20
Ronaldo. Zamenhoffesto en Berlino kun <i>La Ondo</i>	23
Katalin Kováts. Zamenhof-puzlo vendita kontraŭ pli ol 12 mil eŭroj	24
Paweł Fischer-Kotowski. Zamenhofa naskiĝtago en Bjalistoko kaj Grodno	25
Johann Pachter. Vieno: En la Pola Instituto	26
Chen Ji. Ekspozicio kaj festkunveno en Pekino	27
La unua islama Zamenhofa festo	28
Arikapalli Girdhar Rao. BEK-18: Babilado, kantado, kaj nova Estraro.....	29
Davis López Rueda. Tio estas Esperantujo: diverseco kaj efika komunikado samtempe	31
Irina Gonĉarova. La 13a Moskva Lingva Festivalo: novaj perspektivoj.....	34
Povilas Jegorovas. Vytenis Andriukaitis subtenas la 55an BET	36
Antanas Visockas. Ekskursia programo de BET-55	38
Povilas Jegorovas, Aleksander Korĵenkov. BET-55: Kontribuo de Vytautas Šilas	39
Bert Schumann. AŬTUNE en la Esperanto-kastelo	40
Pierre Oliva. Staĝo en Provenco.....	41
AlKo. Kalle Kniivilä forsendita el Moskvo	41
Humphrey Tonkin. Speciala jaro, kun specialaj dankoj!.....	42
Povilas Jegorovas. BET-55 vekas grandan intereson.....	42
Koncize (11 informoj)	43

Arkivo	44
Aleksander Korĵenkov. Jubileoj kaj memordatoj en januaro 2019	45
Vytautas Šilas. Tutanime por Esperanto	46
Kulturo	54
Jack London. Sanon al la viro sur la glitvojo (Tradukis el la angla Thierry Tailhades) ...	55
Nikolao Gudskov. Esperantistoj ekkomprenis la rumanan! (Recenzo: Ioan Slavici. <i>La muelilo de la fortuna</i>)	62
<i>Unesko-Kuriero</i> celebras la Tagon de Homaj Rajtoj	63
Halina Gorecka, Aleksander Korĵenkov. Kristnaska donaco de <i>La Ondo</i>	64
Flo Martorell. <i>Tro</i> : nova bitalbumo aperos la 12an de januaro	65
Ricevitaj gazetoj	65
Belartaj Konkursoj de UEA alvenas al sia 70a eldono	66
Forpasis Gianfranco Molle kaj Baldur Ragnarsson	67
Mozaiko	68
Valentin Melnikov. Pisemismo	69
István Ertl. Spritaj splitoj kaj preskeraroj	70
Kiel aboni <i>La Ondon</i>	71

Kovropaĝo: La organizantoj de la 13a Moskva Lingva Festivalo: Anton Somin, Irina Gonĉarova, Vladimir Fajer, Anastasija Golc, Igor Mokin, vd. p. 34-35. (Foto: Aleksej Bobrinjov)

Ni en la reto:

La Ondo de Esperanto: <http://esperanto-ondo.ru/Ind-ondo.htm>

Abono 2018: <http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Elŝuteblaj libroj: <http://esperanto-ondo.ru/Libroj/Libroj.php>

Novaĵretejo La Balta Ondo: <http://sezonoj.ru/>

Radio Esperanto: <http://radio.esperanto-ondo.ru/>

Halina en FB: <https://www.facebook.com/halina.gorecka.3>

Aleksander en LJ (ruse): <http://sezonoj.livejournal.com/>

Ruslingva informretejo: <http://rusa.esperanto-ondo.ru/>

Temo



La japana esperantisto Hori Jasuo estas elektita kiel la Esperantisto de la Jaro 2018. Li estas la dua sinsekva Azia ricevinto de ĉi tiu honora titolo.

Hori Jasuo: La Esperantisto de la Jaro 2018

La Ondo de Esperanto en 1998 iniciatis ĉiujaran proklamadon de la Esperantisto de la Jaro. Al ĉi tiu projekto aliĝis reprezentantoj de diversaj tendencoj en la Esperanto-komunumo kaj sendependaj kompetentuloj.

Kiel la unua laŭreato en 1998 estis elektita William Auld. En 1999 lin sekvis Koppel Enderby. En 2000 estis distingitaj tri personoj: Hans Bakker, Mauro La Torre kaj Jouko Lindstedt. Poste laŭreatiĝis Osmo Buller (2001), Michel Duc Goninaz (2002), Dafydd ab Iago (2003), Helmar Frank (2004), Povilas Jegorovas (2005), Bertilo Wennergren (2006), Peter Zilvar (2007), Ilona Koutny (2008), Aleksander Korĵenkov (2009), Katalin Kováts (2010), Dennis Keefe (2011), Peter Baláž (2012), Mark Fettes (2013), Mireille Grosjean (2014), Chuck Smith (2015), Stefan MacGill (2016) kaj Trezoro Huang Yinbao (2017).

En 2018 la elektado de la Esperantisto de la Jaro okazis por la 21a fojo. Ĉi-jare 18 kandidatigantoj proponis 22 kandidatojn, al kiuj 17 elektantoj jene donis siajn voĉojn:

Hori Jasuo.....11 voĉoj
Halina Gorecka5 voĉoj
Carlo Minnaja.....4 voĉoj
Peter Baláž.....3 voĉoj

Kvar kandidatoj ricevis po du voĉojn, tri kandidatoj ricevis po unu voĉon.

Hori Jasuo, 77-jara universitata instruisto el Japanio, eksa estrarano de Japana Esperanto-Instituto (1993–2014) kaj de UEA (2007–2010), redaktoro de *La Revuo Orienta* kaj poste de *Esperanto en Azio*, prezidanto de Komisiono pri Azia Esperanto-Movado (KAEM) en la jaroj 2001–2006 estas elektita la Esperantisto de la Jaro 2018 pro la lanĉo kaj daŭra funkciigo de la populara legoprojekto “Esperanto-Sumoo”, kiu en novembro 2018 atingis la 55an sesion kun pli ol 300 legemuloj el 33 landoj, kaj pro la regula verkado kaj eldonado de la esearo *Raportoj el Japanio*, kies 21a volumo aperis ĉi-jare ĉe lia eldonejo *Horizonto*.

Gratulon al la Esperantisto de la Jaro 2018, Hori Jasuo!

Paweł Fischer-Kotowski
sekretario

Legu pli detale pri la projekto La Esperantisto de la Jaro:
<http://esperanto-ondo.ru/lnd-jaro.htm>

Elektokomisiono de La Esperantisto de la Jaro 2018

Proponantoj

- Marija Belošević (Kroatio): vic-prezidantino de IKUE
Marek Blahuš (Ĉeĥio): eksestrarano de E@I, vikimediano, komputila lingvisto
Renato Corsetti (Britio): eksprezidanto de UEA
István Ertl (Luksemburgio): tradukisto ĉe Eŭropa Revizora Kortumo
Edmund Grimley Evans (Britio): eksprezidanto de EAB
Maritza Gutiérrez González (Kubo): estro de la Esperanto-redakcio de Radio Havano
Dafydd ab Iago (Belgio): eksdirektoro de la Brusela Komunikadcentro de EEU
Aleksander Korĵenkov (Ruslando): ĵurnalisto kaj verkisto
Lee Jungkee (Koreio): direktoro de Seula Esperanto-Kulturcentro
Vinko Markovo (Francio): prezidanto de la Plenum-Komitato de SAT
Valentin Melnikov (Ruslando): poeto, ĵurnalisto, tradukanto
Barbara Pietrzak (Pollando): radioĵurnalisto, redaktoro
James Rezende Piton (Brazilo): konsilanto de BEL, aktivulo de Skolta Esperanto-Ligo
Chuck Smith (Usono/Germanio): kunfondinto kaj teknikestro de Amikumu
Franciska Toubale (Aŭstralio): kunlaboranto de la radio 3ZZZ
Sibayama Zyun'iti (Japanio): estrarano de JEI, ĉefredaktoro de *La Revuo Orienta*
Paulo Sergio Viana (Brazilo): tradukanto kaj preleganto
Ĉielismo Wang Tianyi (Ĉinio): prezidanto de IKEF, direktoro de Ĉina Esperanto-libro servo, komitatano de Ĉina Esperanto-Ligo

Elektantoj

- Peter Baláž (Slovakio): kunordiganto de E@I
Petr Chrdle (Ĉeĥio): posedanto de la eldonejo KAVA-PECH
Agneta Emanuelsson (Svedio): prezidanto de ILEI-SE
Mireille Grosjean (Svislando): prezidanto de ILEI
Anna Jausions (Francio): eksprezidantino de OSIEK
Reza Kheir-khah (Tajvano): redaktoro de *Formoza Folio*
Gbeglo Koffi (Togolando): administranto de la Afrika Centro Esperantista
Ilona Koutny (Pollando): gvidanto de la Interlingvistikaj Studoj ĉe UAM
Katalin Kováts (Nederlando): lingvisto, metodologo, redaktoro de edukado.net
Liu Haitao (Ĉinio): profesoro pri (inter)lingvistiko
Trezoro Huang Yinbao (Ĉinio): ĉefredaktoro de *Unesko-Kuriero*, direktoro de Esperanto-Centro

Ora Ponto

- Vasil Kadifeli (Turkio): tradukanto, eldonanto de *Turka Stelo*
Tahira Masako (Japanio): kunlaboranto de KAEM
Sergio Pokrovskij (Ruslando): sciencisto, tradukanto, eseisto
Anna Ritamäki-Sjöstrand (Finnlando): prezidanto de kooperativo Esperanto-Gastigejo en Lesjöfors
Roland Rotsaert (Belgio): redaktoro de *Monato* pri ekonomio
Syôzi Keiko (Japanio): revizoro de JEI, eldonanto ĉe *Libroteko Tokio*

Sekretario

- Paweł Fischer-Kotowski (Pollando)

Tribuno



Se oni demandus nin pri *nia* ĉefa atingo en la jaro 2018a, ni senhezite respondus per la siglo NDK, ĉar per la eldono de la enciklopedio finiĝis nia dekjara laborego, kaj danke al tio ni unuafoje en ĉi tiu jarcento ĝuis kelksemajnan ripozon... Sed la enmondigo de NDK ankaŭ donis al ni la taskon prezenti ĝin. Ĉi tiun agrablan taskon ni plenumis en Vilno, Liptovský Mikuláš, Budapeŝto, Poznano kaj laste en Berlino je la Zamenhofa Festo 2018. (Foto: Taesok Choe, Vilno, aprilo 2018)

Niaj atingoj kaj malsukcesoj en 2018

Ĉi-jare *La Ondo* denove petis diverstendencajn aktivulojn respondi la tradician demandon: “Kiu(j) Esperanto-evento(j) en la 2018a jaro, laŭ via opinio, estas la plej pozitiva(j) kaj la plej negativa(j)?”. Ni ricevis respondojn de rekorde multaj 18 personoj, kiujn ni dankas pro la kontribuoj al nia “Ronda Tablo”.

Mark Fettes (Kanado) **Prezidanto de UEA**

Pozitive:

UEA interkonsentis kun Duolingo en junio pri kunlaboro pri la organizado de lokaj eventoj por lingvolernantoj: <http://www.gazetaro.org/duolingo/>. Tio estis grava paŝo al kunligado de retaj lernantoj al multaj lokaj movadoj. Esperanto nun troviĝas inter la plej popularaj lingvoj de tiaj eventoj tutmonde.

Rezulte de diplomaciaj elpaŝoj en Novjorko kaj Ĝenevo, UEA elektiĝis por trijara periodo en la estraron de internacia kunordiga grupo de neregistaraj organizoj ĉe Unuiĝintaj Nacioj, konata per la mallongigo CoNGO. Kiel estrarano de CoNGO, UEA kunlaboras kun 17 aliaj grandaj internaciaj NROj, ligante pli firme la ideon de Esperanto al la laboro por paco, homaj rajtoj kaj daŭripova evoluigo.

La nova Ĝenerala Direktoro de UEA, Martin Schaeffer, enoficiĝis jarkomence kaj prioritatis la stabiligon de la financoj kaj membraro. La Asocio finis la jaron kun malpli alta defecito kaj pli alta membronombro, ol en 2017.

La Komitato de UEA tre aktive laboris de la komenco de la jaro ĝis la kongreso, interalie elektante tri novajn estraranojn kaj akceptante novan kotiz-sistemon. La nova sistemo proponas rabatojn por junaj membroj kaj tre malaltajn kotizojn por la plej malriĉaj landoj.

La 103a UK en Lisbono estis kulture riĉa kaj unu el plej grandaj en la lasta jardeko, kun 1567 partoprenantoj. Elstaris ankaŭ la salutmesaĝo de la nova Ĝenerala Direktoro de Unesko, Audrey Azoulay, kiu elokvente esprimis la idean proksimecon de la Esperanto-movado al la laboroj de Unesko por antaŭenigi dialogon kaj defendi kulturan kaj lingvan diversecon.

Negative:

La laboroj pri la diversaj retejoj de UEA ne venis al fina stadio kaj publikigo en 2018, malgraŭ diversflankaj klodopoj.



Peter Baláž (Slovakio)

E@I-kunordiganto

Pozitivaĵoj:

Denove ege sukcesa “Polyglot Gathering” en Bratislavo, kiu iĝis la plej granda renkontiĝo de plurlingvuloj tutmonde (kaj ĝenerale pli da videbligo de Esperanto inter poliglotoj).

Daŭre pligrandiĝanta kvanto de retaj Esperanto-lernantoj.

Tre inspira Nitobe-simpozio post la UK en Lisbono, okazinta subtene de ESF.

Tre profesia kaj pozitiva TEDx-prelego pri Esperanto (angle) de Ester Schor (aŭtorino de *Bridge of words*), spektebla ĉe: <https://www.youtube.com/watch?v=Z-sHQcK46IvI>.

Publika prezento kaj reeldono de la unua opereto en Esperanto (de Feliks Hiller) fare de la Bjalistoka Esperanto-Societo.

Prezento de la opero *Sternenhoch* en Esperanto fare de la Nacia teatro en Prago.

Negativaĵoj:

Daŭra malkresko de membroj sed ankaŭ de aktivuloj en diversaj Esperanto-organizoj internaciaj, naciaj kaj junularaj.

Maltrafita ŝanco de la 103a UK en Lisbono – apenaŭa videbligo de Esperanto kaj ĉefe de la kongreso ne nur tutlande sed eĉ en la urbo mem (maltroa informado/reklamado, praktike nulaj eksteraj rilatoj).

Bedaŭrinda forpaso de kelkaj gravaj esperantistoj, plej laste de Baldur Ragnars-son.



Vinko Markovo (Francio)

Prezidanto de la Plenumkomitato de SAT

Inter la sukcesoj endas menciiti la ampleksan kontribuon de najbaraj esperantistoj el Hispanio al la sukcesigo de la unua UK en Portugalio. Bela pruvo pri kunlaboro super landlimoj. Ankaŭ reliefigenda ŝajnas al mi la projekto “Militrakonto” (<https://mondmilito.hypotheses.org/>), kiu kolektas materialon por la esplorado de travivaĵoj pri la dua mondmilito el transnacia perspektivo. Ĝi estas bela ekzemplo pri la kapablo de la esperantistaro provizi originalan perspektivon pri temo, kiu koncernas ĉiujn. Kaj krome helpas informi nekafulojn pri la konkreta laborado de sciencistoj, pagitaj grandparte de iliaj impostoj.

Bedaŭrinda estas la daŭra malforteco de Esperanto-movado en Sudorienta Eŭropo, konstatebla ĉi-jare dum la SAT-kongreso en Kragujevac. Ne mirige en mondoparto, kie multaj junuloj devas fuĝi alilanden por trovi laborpostenon. Des pli salutinda estas la persistemo de tieaj aktivuloj, kies laboro semos la grenojn por iama rekresko de la movado.



Zhang Ping / Ĝoja (Ĉinio)

**Redaktoro de Esperanto-sekcio de Ĉina Radio Internacia
Vicĝenerala sekretario de Pekina Esperanto-Asocio**

Pozitivaĵoj:

En 2008 Wei Yubin (Jado), direktoro de la elementa lernejo Baiyangshujie en Taiyuan (Ĉinio), ekinstruis Esperanton en sia lernejo, ĉi-jare ĉi tiu kurso dekjarigis. Dum dek jaroj esperantistoj el kelkaj landoj instruis Esperanton en la lernejo, lernejanoj kaj instruistoj partoprenis en IIK, UK kaj aliaj Esperanto-aranĝoj.

Te-amo-anoj daŭre agis. Aŭguste okazis festo por la 85-jariĝo de Esperanto-klubo en Svitavy (Ĉeĥio), dum kiu te-amo-anoj donis atestilon pri la urbo de Teo kaj Amo al la vicurbestro de Svitavy; okazis fotoekspozicio de Teo kaj Amo en la urba biblioteko de Nový Jičín; en multaj ĉinaj urboj lokaj E-kluboj organizis filmprezentojn en universitatoj, mezlernejoj, elementaj lernejoj ktp.

Septembre en Zaozhuang-a Universitato ekfunkciis oficiala fako de Esperanto, aprobita de la ĉina Eduka Ministerio. Nun en ĝi lernas pli ol 20 studentoj.

Negativaĵo:

Financa problemo daŭris ĉe UEA. Mi esperas, ke en 2019 la stato pliboniĝos.



Giorgio Silfer

**Konsulo de la Esperanta Civito
Verkisto kaj organiza konsilisto**

Pozitive:

1) La konstanta, kvankam ne rapida, kresko de iniciatoj ekster la tradiciaj esperanto-movadoj, ĉu pro privataj entreprenoj (kiel E@I), ĉu pro aktiveco en la virtuala mondo, ĉu pro novtipaj aranĝoj (ekz. Polyglot), ĉu pro alternativa organiza modelo (la Esperanta Civito).

2) La fortikiĝo de la eksteraj rilatoj de Tutmonda Esperantista Junulara Organizo.

3) La proksimiĝanta bankroto de Universala Esperanto-Asocio, ĉar ĝi malfermos novan epokon en nia historio.

Negative:

1) La daŭra tendenco en Roterdamo alproprigi al UEA la meritojn pro alies atingoj.



Ĝi estas demonstra versio de la 76-paĝa januara *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:


<http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Eventoj

15 grudnia 1859 r.
w Białymstoku urodził się

**LUDWIK ŁAZARZ
ZAMENHOF**

żydowski lekarz,
inicjator międzynarodowego
języka esperanto



La Zamenhofs Tago, kiu samtempe estas la Tago de la Esperanta Libro, ĉi-jare estis vaste festata en Esperantujo, ankaŭ ĉar ĉi-jare ĝi okazis dum feria tago, sabate.



Petras Čeliasukas prezentas sian vortaron (Foto: Gražvydas Jurgelevičius)

Kongreso en Kaŭno: renkonte al la centjariĝo de LEA

La 15an de decembro en Kaŭno okazis vica, la 54a, kongreso de Litova Esperanto-Asocio (LEA) sekvita de la tradiciaj Zamenhof-Tagoj 2018. Tamen ĝi estis ne nur vica pro tio, ke dum ĝi finiĝis la oficperiodo de la ĝisnuna Estraro de LEA, kaj oni devis elekti la novan. Krome ĝi okazis renkonte al la venont-jara centjariĝo de LEA. La sekva jaro estas grava ankaŭ pro alia jubileo – en 2019 la tradicia aranĝo Baltiaj Esperanto-Tagoj fariĝos 60-jara. Nome en Litovio, en la urbo Panevėžys en julio 2019 okazos la 55aj Baltiaj Esperanto-Tagoj.

Al la kongreso venis iom pli ol 100 personoj. La raporton pri la agado de la asocio dum 2018 faris la prezidanto de LEA Povilas Jegorovas. Li substrekis, ke ĝenerale la jaro estis sukcesa kaj ke dum la jaro la agado evoluis ĉefe en jenaj kvin direktoj:

1. Laboro por eldoni la grandan litovan-Esperantan vortaron. Petras Čeliasukas finverkis ĝin fine de 2017. Preskaŭ duonjaron daŭris la redaktado, kion faris Antanas Grincevičius. Poste oni devis trovi taŭgan eldonejon kaj garantii financadon de la eldono. Dum plia duonjaro tiuj problemoj estis solvitaj, kaj en novembro 2018 la vortaro estis presita. Tio estas gravega atingo, kaj per tio Litovio eniris en liston de nemultaj landoj, kiuj havas tiom ampleksan nacilingvan-Esperantan vortaron.

2. Rondirigo de la ampleksa ekspozicio pri Zamenhof. Dum la jaro ĝi estis ekspoziciata en Kaŭna universitato Vytautas La Granda, en la urba municipo de Panevėžys, en la regiona parko de Veisiejai, en la regiona muzeo de Lazdijai, en

la akvoparko de Druskininkai, en la kulturcentro de Merkinė, kaj en la kulturcentro de Šalčininkai. Post la novjarfesto ĝi iros al la regiona muzeo de Švenčionys. Ĉi tiu ekspozicio estas tre grava ne nur pro sia kvalito kaj detala prezento de Esperanto, sed ankaŭ pro tio, ke ĝi ebligas vaste informi publikon pri Esperanto per amaskomunikiloj. En ĉiu urbo okaze de la ekspozicio aperis multaj publikaĵoj.

3. Preparado de la 55aj Baltiaj Esperanto-Tagoj, kiuj okazos sekvontjare en Panevėžys. Tiu laboro komenciĝis en marto – ĉefe temas pri informado pri BET-55 kaj ĝia reklamado tra la tuta mondo, sed ankaŭ estis solvataj multaj aliaj organizaj demandoj. La informado pri BET-55 estas vastega kaj diversflanka. Diversaj informoj pri ĝi aperis preskaŭ en ĉiu lando, kie estas esperantistoj. Eblas kuraĝe diri, ke BET-55 estas la plej vaste kaj bone reklamata internacia esperantista aranĝo en la tuta mondo. Kaj tio donas bonajn rezultojn. La nombro da aliĝintoj al BET-55 jam superis 200 personojn el 22 landoj. Ĝis la malfermo de BET la nombro atingos 300 homojn, kio estas nia celo, kaj superos ĝin.

4. Komenco de la laboro por atribui al Esperanto la titolon de nemateria kultura heredaĵo en Litovio. Tiun laboron iniciatis la Litovia membro de Eŭropa Komisiono Vytenis Andriukaitis. La ministerio de kulturo kolektis opiniojn de Litovia Scienca Akademio kaj de la nacia kultura centro de Litovio. Nun la ĉefan laboron devas fari LEA por kolekti diversajn dokumentojn kaj pruvojn. Tio ne estas facila. Tiun statuson Esperanto jam akiris en Pollando kaj Kroatio. Nun similan laboron oni faras ankaŭ en Slovakio. Litovio ne havas tiom multe da pruva materialo, kiom oni havas en Pollando kaj Kroatio, tamen ni esperas pri fina pozitiva decido.

5. Solvado de la problemoj de la Zamenhof-Domo en Kaŭno. La domo nun estas en kaduka stato kaj bezonas gravan renovigon. Por tio ni devas trovi ampleksan financadon kaj solvi multajn organizajn problemojn, ĉar dum la lasta jardeko en Litovio ŝanĝiĝis multaj leĝoj kaj oni devas adapti la staton de la domo al la nunaj kondiĉoj. Ankaŭ tio postulas amason da tempo kaj energio.

Kompreneble, la agado de LEA ne limiĝis al la kvin listigitaj direktoj. Parolante pri la informado pri Esperanto, oni devas diri, ke nun en Litovio estas pli ol dek retaj kaj paperaj tutlandaj amaskomunikiloj, kiuj volonte publikigas nian materialon. Pro tio la informado pri Esperanto en Litovio estas vere bona. Dum la jaro ni publikigas pli ol 100 diversajn materialojn pri nia agado.

Parolante pri la internacia agado de LEA, unue oni devas mencii, ke la litovia membro de Eŭropa Komisiono Vytenis Andriukaitis en la 103a UK en Lisbono estis elektita membro de Honora Patrona Komitato de UEA. Litoviaj esperantistoj multnombro partoprenis la UKon en Lisbono kaj la 54an BET en Pärnu. Po kelkaj personoj partoprenis en SES en Slovakio, ARKONES en Pollando, IJK en Hispanio. LEA estis reprezentita en la ukrainia kongreso kaj en aliaj esperantistaj aranĝoj. Daŭras fruktodona kunlaboro kun esperantistoj de Kaliningrado.

En kelkaj urboj okazas instruado de Esperanto (Kaŭno, Šiauliai, Panevėžys, Mažeikiai). Tiun agadon oni devas nepre aktivigi.

En la eldona kampo krom la jam menciita vortaro, aperis en Panevėžys traduko de *Kialulo* de Vytautas Petkevičius. LEA estas kuneldoninto (kun *Sezonoj*, Kaliningrado) de la gravega enciklopedio *Nia diligenta kolegaro*.

El esperantistaj aranĝoj, okazintaj en 2018 en Litovio, oni devas menci la ĵurnalistan tendareton en Aukštadvaris kaj la polan-litovan junularan esperantistan aranĝon en Vilno kaj Kaŭno.

En Litovio menciindas tre bona interna informado inter esperantistoj. Ĉiutage aperas novaj informoj (almenaŭ unu, sed ofte eĉ kelkaj) en tri lokoj: retlisto de litovijaj esperantistoj ĉe Yahoo (ekde 2000), Facebook-paĝo de LEA (ekde 2012) kaj en la retejo de LEA (ekde 1996). Tio sendube estas la plej bona informado inter esperantistoj en la tuta mondo.

Post la agadraporto okazis diskuto. En ĝi parolis Audrys Antanaitis (Vilno), Stasys Raulynaitis (Jurbarkas), Zenonas Sabalys (Šiauliai), Marijus Dilba (Vilno).

La prezidanto de LEA enmanigis dankleterojn al 25 jubileuloj (de 50- ĝis 80-jaruloj).

Sekvis elektado de nova Estraro de LEA. Kiel prezidanto denove unuanime estas elektita Povilas Jegorovas – jam por la sesa kvinjara periodo. Aliaj kandidatoj mankis. La nova prezidanto proponis la liston de la Estraro, ĉiuj estis elektitaj sen kontraŭaj voĉoj: Povilas Jegorovas – prezidanto, Arimantas Račkauskas – la unua vicprezidanto, Gražina Opulskienė – vicprezidanto, Irena Alijošiūtė – respondeca sekretario; Ramūnas Narbutas, Algimantas Piliponis, Stasys Raulynaitis, Virginija Gurskienė, Audrys Antanaitis, Kazys Tamošėtis, Vida Kulikauskienė, Zenonas Sabalys, Danutė Statkuvienė, Vita Petronytė, Gediminas Kazlauskas – membroj.

Post la tagmanĝa paŭzo komenciĝis Zamenhof-Tagoj 2018, kies ĉefa “najlo” estis prezento de la nova granda litova-Esperanta vortaro. Parolis ĝia aŭtoro Petras Čeliaskas, redaktoroj Antanas Grincevičius kaj Danutė Vidrinskienė. Venis kaj parolis la eldonisto Valdas Kubilius – direktoro de la Monda centro de litovoj pri kulturo, scienco kaj edukado. Estis venditaj pli ol 50 ekzempleroj de la nova vortaro.

Alia grava programero estis prelego “La unua dudekjara de LEA” de Vytautas Šilas renkonte al la centjariĝo de Litova Esperanto-Asocio.

Sabate vespere okazis koncerto de la ensemblo de Muzika akademio de la Kaŭna universitato Vytautas La Granda – Gintarė Kaminskaitė (violonĉelo), Živilė Kudirkaitė (piano) kaj Gabrielė Kuzmickaitė (kantistino).

Dimanĉe restintaj esperantistoj renkontiĝis kaj konversaciis pri diversaj movadaj kaj aliaj temoj.

Funkciis riĉa libroservo. Oni povis pagi membrokotizojn de LEA kaj de UEA. Eblis aliĝi al la sekvontjara BET-55 en Panevėžys, kaj tion faris 20 partoprenantoj. Al la 104a UK en Lahtio aliĝis 8 personoj.

Povilas Jegorovas



Prezentado de *Nia diligenta kolegaro* en Berlino (Foto: Fritz Wollenberg)

Zamenhoffesto en Berlino kun *La Ondo*

Denove berlinaj kaj brandenburgiaj esperantistoj invitis al Zamenhoffesto en la renkontiĝejo de la distrikto Lichtenberg, kiu nomiĝas Kiezspinne (kvartala araneo). La domo mem nomiĝas Oranĝerio pro la ekstera koloro de la konstruaĵo.

Ĉi-jare ni sukcesis celebri la datrevenon de la naskiĝtago de Zamenhof ekzakte la 15an de decembro. La salonon ni jam mendis unu jaron antaŭe.

Al la Zamenhoffesto venis ĉirkaŭ 40 personoj. Denove venis geamikoj el Szczecin kaj Zielona Góra, sed ankaŭ el Moskvo. Speciale invititaj estis Halina Gorecka kaj Aleksander Korĵenkov el Kaliningrado por la festprelego. La eldonantino kaj la redaktoro de *La Ondo de Esperanto* tre bone prezentis sian enciklopedion *Nia diligenta kolegaro* kun 200 biografioj de eminentaj esperantistoj tutmonde, menciinte multajn interesajn faktojn kaj fonajn anekdotojn kaj ankaŭ la resuman statistikon. Dum la prelego ili speciale atentigis pri esperantistoj, kiuj vivis en Berlino aŭ havis rilatojn al Berlino kaj Brandenburgio.

Interesa kontribuado ankaŭ estis raporto de Ronald Schindler pri la UK en Lisbono. Sekvis raporto pri la stato de la preparoj por la Germana-Pola Esperanto-Kongreso en 2020, kiu okazu en Frankfurto ĉe Odro. Ulrich Brandenburg, prezidanto de la Germana Esperanto-Asocio, menciis la atingojn sed ankaŭ la problemojn, kiuj aperis dum la pasintaj monatoj.

Fritz Wollenberg prezentis la festlibron pri Ulrich Lins, la aŭtoro de la libro *La danĝera lingvo*, kiu ĉi-jare festis la 75an datrevenon de sia naskiĝo.

Halina Gorecka ĝojigis la ĉeestantojn per proklamo de la elekto de la Esperantisto de la Jaro 2018. Ĉi tiun honoran titolon per plimulto da voĉoj ricevis la japana samideano Hori Jasuo.

Grandajn aplaŭdojn ricevis la koncertoj de Stephan Schneider el Berlino kaj de Elena Wilke de ĴeLe el Ŝvedt.

Denove okazis la kutima kafumado. Vespere ni estis regalitaj per bongusta supo kun kolbasetoj kaj bele ornamitaj bulkoj. La kuiristoj ne forgesis prezenti ankaŭ vegetarajn/veganajn manĝaĵojn.

La sekvonta Zamenhoffesto okazos la 14an de decembro, espereble en la sama domo. Do jam notu la daton por certigi vian partoprenon!

Ronaldo

Zamenhof-puzlo vendita kontraŭ pli ol 12 mil eŭroj



(Edukado.net) Antaŭ unu jaro okaze de la Zamenhofa Tago 2017 ni lanĉis mon-kolektan kampanjon “Puzlo-donacoj”. La portreton de la majstro, desegnititan por edukado.net, fare de Richard Wagner el Belgio, ni tranĉigis je 120 pecoj, kiujn ni vendis. La aĉetantoj ne sciis kiun pecon ili aĉetis. La numerojn de la pecoj ni malkaŝis nur kiam ĉiuj pecoj estis venditaj. La minimuma kosto de unu peco estis 10 eŭroj.

Okaze de la Zamenhofa Tago 2018 kaj de la naskiĝdatreveno de la retejo Edukado.net ni kun ĝojo informas vin, ke nia Zamenhof-portreto, kiu konsistis el 120-puzlopecoj, sukcese vendiĝis. Ni kolektis per ĝi 12 mil 124,86 eŭrojn. Ĉi tiun sumon ni elspozos por la modernigo de la retejo. Tiuj laboroj komenciĝos en la jaro 2019.

La puzlopecojn aĉetis ĉirkaŭ cent diversaj personoj. La plej granda donaco venis de nia delonga subtenanto, Synnöve Mynttinen el Finnlando, de kiu ni ricevis 2400 eŭrojn. Tiel estas ŝi, kiu ricevos la fizikan puzlon. Ni aparte dankas Synnöve.

Katalin Kováts

Zamenhofa naskiĝtago en Bjalistoko kaj Grodno

Jam por la 19a fojo okazis la tradiciaj Bjalistokaj Zamenhof-Tagoj – de la 14a ĝis la 16a de decembro 2018 kelkdeko da personoj festis la naskiĝtagon de L. L. Zamenhof en lia naskiĝurbo.

Vendrede oni inaŭguris du ekspoziciojn: “Bildoj de juda Bukareŝto” kaj “Esperanto-eldonaĵoj el Bjalistoko – de Jakobo Ŝapiro ĝis hodiaŭ”. Pri la unua kunlaboris Rumana Kulturinstituto en Varsovio. Ĉi tio ne estis la sola rumanaĵo en la evento, ĉar tuj poste Ionel Oneț prelegis pri la rumana literaturo en Esperanto. Sekvis prezento de nova ero en tiu kategorio: *Verkaro (preskaŭ) kompleta* de Max Blecher, pretigita de Ionel Oneț kaj Tomasz Chmielik. La dika volumo enhavas tri romanojn, kurtan prozon, poemojn kaj aforismojn de la juda-rumana aŭtoro. Kvankam lastatempe oni malkovras la talenton de Blecher en diversaj lingvoj kaj landoj – en Pollando ĵus aperis traduko de lia tria romano – Esperanto estas ĝis nun la sola lingvo en kiun oni tradukis (preskaŭ) ĉion verkitan de li.

Sabate okazis prelegoj pri la 19-jarcenta Bjalistoko (Nina Pietuchowska), (mult) lingva problemo nuntempe (Konrad Andrzejuk) kaj la Esperanto-traduko de *Sinjoro Tadeo* (Roman Dobrzyński). Post la prelegoj oni honoris la grandan bjalistokanon ĉe lia monumento. Sub la brusto de Zamenhof la florkronon nome de la urbo metis vicurbestro Rafał Rudnicki.



Foto: Nina Pietuchowska

Kadre de la aranĝo estis prezentitaj la rezultoj de la literatura konkurso “Valoras lerni Esperanton, ĉar...”. Ĉi-foje alvenis rekorde multaj laboraĵoj, entute 22, el kiuj la ĵurio kiel la plej bonan indikis la verkon *Am-Lingvo* de Éva Baloghne Fodor. La duan premion ricevis Johann Andreas Pachter pro *De Cambodunum al Danubo* kaj la trian – Andrzej Tichomirow pro la verko *Zamenhof w Grodnie*. Ĉi-lasta ĉeestis persone, kaj la organizantoj povis enmanigi al li la premion kaj diplomon. Ĉiuj tekstoj senditaj por la konkurso aperis en la 8a volumo de *Bjalistokaj Kajeroj*.

Tre interesa estis ankaŭ la arta programo. Apud la prezentoj de bjalistokaj infanoj kiuj lernas Esperanton, la bando *Frey-Lech Trio* de Lech Mazurek ludigis kelkajn kantojn el la opereto *Ho, tiuj fremduloj!* de Feliks Hiller – la unua kaj verŝajne sola originala Esperanto-opereto, eldonita en Bjalistoko en 1923 kaj ĵus reeldonita de Tomasz Chmielik.

Dimanĉe okazis tuttaga ekskurso al Grodno en Belarusio, kie en la jaroj 1893-1897 L. L. Zamenhof vivis kun siaj familianoj kaj laboris kiel okulkuracisto. La polingva ĉiĉerono gvidis la grupon ne nur al konataj kaj vizitindaj lokoj de la urbo, kiel ekzemple la domo de Eliza Orzeszko, sed ankaŭ al la loko kie loĝis Zamenhof. Ekde 1991 sur tiu domo, ĉe la strato Policejskaja (nuntempe: Kirova), pendas memorotabulo.

La 19ajn Bjalistokajn Zamenhof-Tagojn organizis Bjalistoka Esperanto-Societo, Bjalistoka Kulturcentro – Centro Ludoviko Zamenhof kaj Podlaĥia Libraro “Łukasz Górnicki” en Bjalistoko. Venontjare, okaze de la 160a naskiĝdatreveno, ankaŭ la aranĝo havos sian jubileon, kiam ĝi okazos por la 20a fojo.

Paweł Fischer-Kotowski

Vieno: En la Pola Instituto

La 8an de decembro la Pola Instituto en la ĉefurbo de Aŭstrio akceptis centon da patrorenantoj de Zamenhoffesto. La direktoro de la instituto en sia satulparolado menciis, ke jam estas longa tradicio de la komuna festado kun la Aŭstria Esperanto-Federacio okaze de la naskiĝtagdatreveno de Zamenhof. Poste Martin Stuppig prezentis reeldonon de sia libro *Menschlich in der Unmenschlichkeit*, kiun li unue verkis, por ke liaj filoj kaj nepoj sciu, kiel terura estis milito en kiu li devis militservi.

Ĝi estas demonstra versio de la 76-paĝa januara *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Arkivo



Antaŭ 95 jaroj, la 1an de januaro 1924 naskiĝis Grégoire Maertens, elstara belga esperantisto, prezidanto de UEA dum 1980-86. Sub lia prezidanteco okazis plivastigo de la domo de UEA en Roterdamo, membrokreskado je pli ol ses mil personoj dum ses jaroj, financa stabiligo, funkciigo de UEA-oficejoj en Novjorko, Budapeŝto kaj Antverpeno. La sukcesaj ekstereŭropaj UKoj en Brazilo (1981) kaj Ĉinio (1986) stimulis la internaciigon de UEA sojle de la centjariĝo de Esperanto. Ni deziras al Grégoire, kiu dum pluraj jaroj abonis *La Ondon*, multajn serenajn vivojarojn! (Foto: Ziko van Dijk)

Jubileoj kaj memordatoj en januaro 2019

1. Antaŭ 95 jaroj naskiĝis **Grégoire Maertens** (1924-1940-), belga financoficisto k e-isto; komitatano (1960-2004), estrarano (1977-92) k prezidanto (1980-86) de UEA, direktoro de Instituto Hodler'68 (1972-2013), aŭtoro de pluraj artikoloj en/pri Eo, honora membro de UEA (1993). — Legu pli en NDK, p. 186-187.

4. Antaŭ 70 jaroj naskiĝis **Spomenka Štimec** (1949-1965-), kroata filologino dum 40 jaroj laborinta per Eo ĉe IKS (1972-94) k KEL (1995-2012); redaktorino de *Tempo* (1996-), estrarano de UEA (1989-92), membro de la Akademio de Eo (1998-2007), aŭtorino de tri originalaj romanoj (*Ombro sur interna pejzaĝo*, 1984; *Tena – Hejmo en Mezeŭropo*, 1996; *Tilla*, 2002) k kvin novelaroj. — Legu pli en NDK, p. 278-280.

5. Antaŭ 20 jaroj mortis **Ye Junjian** (1914-1931-1999), konata en Eo kiel Cicio Mar, ĉina verkisto k tradukisto, vicprezidanto de Ĉina Tradukista Asocio k de Ĉina PEN-Centro, poligloto k e-isto; komitatano de UEA (1980-92), rektoro de IKU en la 71a UK (Pekino, 1986), vicprezidanto de ĈEL, aŭtoro de la originala novelaro *Forgesitaj homoj* (1937); lia anglalingva romano *Montara vilaĝo* en 1984 aperis en la Ea traduko de W. Auld.

22. Antaŭ 35 jaroj mortis **Clelia Conterno Guglielminetti** (1915-1934-1984), itala instruistino k e-istino; ĉefdelegito de UEA por Italio, kunredaktorino de *Literatura Foiro* k *Rivista Italiana di Eo*, aŭtorino de *Eta vivo* (1969) k *Ho, tomboj de l' prapatroj* (aperis en 2015), membro de la Akademio de Eo (1964-84). — Legu pli en NDK, p. 59-60.

25. Antaŭ 135 jaroj naskiĝis **Montagu Butler** (1884-1905-1970), angla muzikisto k e-isto; sekretario de BEA (1916-34), redaktoro de *The British E-ist* (1931-32, 1941-44, 1947-48); prizorganto de la biblioteko de BEA kiu nun portas lian nomon, membro de la Akademio de Eo; aŭtoro de la popularaj lernolibroj *Eo for beginners* (21 eldonoj) k *First steps in Eo* (poste *Step by Step in Eo*, 9 eldonoj). — Legu pli en NDK, p. 51-52.

26. Antaŭ 90 jaroj naskiĝis **Ada Fighiera-Sikorska** (1929-1956-1996), pola ĵurnalistino k e-istino; kunlaboranto de la E-Redakcio de la Pola Radio ekde la komenco (1959) ĝis la forveturo el Pollando (1960), redaktorino de *Heroldo de Eo* (1962-96), aŭtorino de *De tajgo al minaretoj* (1991), honora membro de UEA (1994). — Legu pli en NDK, p. 91-92.

30. Antaŭ 180 jaroj naskiĝis **Hippolyte Sebert** (1839-1898-1930), franca generalo, sciencisto k e-isto, la plej proksima kunlaboranto de Zamenhof; prezentis Eon en la Franca Akademio de Sciencoj (1901), propagandis Eon prelege, broŝure k gazete; la unua prezidanto de la Organiza Komitato (poste: KKK) fondita fine de la 1a UK, fondinto k gvidanto de E-ista Centra Oficejo en Parizo, kunfondinto k la unua prezidanto de ISAE (1907), fondinto k redaktoro (kun G. Chavet) de *Oficiala Gazeto E-ista* (1908-20), la unua prezidanto de Konstanta Reprezentantaro de Naciaj Societoj (1922-23). En septembro 1920 laŭ lia iniciato kongreso de la Unuiĝo de Internaciaj Asocioj rezoluciis por Eo, en majo 1921 sekvis rezolucio por la uzado de Eo en scienco, subskribita de 21 membroj de la Franca Akademio de Sciencoj. — Legu pli en NDK, p. 251-253.

Aleksander Korjenkov

Tutanime por Esperanto



En januaro 1925 S. Grenkamp (pseŭdonimo de Salomon Kornfeld) skribis en la revuo *Esperanto* (№1): "... komitatano de UEA en Kaunas (Litovio) ne vivas plu! Subite, neatendite dum la Novjara nokto vi mortis, kara amiko mia! [...] Ni perdas en vi unu el la lastaj malnovaj pioniroj de la klasika epoko de nia movado. Ni perdas en vi antaŭ ĉio homon pure noblecan, bonaniman, ĉiam preta helpi al ĉiu veninto. Al kiom da homoj kaj samideanoj, al kiom da viktimoj de la kruela milito vi helpis! Tion scias nur viaj la plej intimaj amikoj, ĉar vi sciis ĉion aranĝi senbrue" [...] Jen kuŝas antaŭ mi via kuraĝiga, sincera letero, nur unu tagon antaŭ la morto skribita, tiom serena. Vi ĝojas pri la konferencoj esperantaj, vi ĝojas povu kunhelpi por sukceso de nia movado".

Ĉi tiuj vortoj estas direktitaj al unu el la fondintoj de Litova Esperanto-Asocio, Paŭlo v. Medem, litovia germano (al esperantistoj li prezentis sin "litovano"), artileria vicolonelo de ruslanda armeo, bankisto, melomano, gvidanto de Kaŭna esperantistaro, akademiano de Esperanto, subtenanto de Esperanto-eldonado. Atentu: la mallongigo "v." signas "von" kaj indikas la nobelan originon (resp. al esp. "de").

En la distrikto Joniškis (norde de Šiauliai) en la 19a jarcento loĝis, venintaj el Latvio, luteranaj grafoj von Medem. Ĉu nia Paŭlo Medem kaj la grafoj parencis, mi ne trovis. Paŭlo Medem naskiĝis la 8an de decembro 1862 en Kaŭno. Li eklernis en la Vira gimnazio de Šiauliai (tiam: Шавельская мужская гимназия; ĝi estis fondita por infanoj de riĉaj kaj nobeldevenaj gepatroj). Tamen, li finis la Minskan Viran gimnazion – lia patro David Medem estis armea kuracisto kaj devis kun sia regimento migri de unu urbo al alia. Poste la filo Paŭlo ekstudis en Sankt-Peterburga Nikolaa Milit-Inĝeniera Akademio.

Ĝi estas demonstra versio de la 76-paĝa januara *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn. Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Kulturo



Preskaŭ ĉiujare en la decembra aŭ januara *Ondo* ni publikigas novelon ligitan kun Kristnasko aŭ Novjarfesto. Ankaŭ ĉi-jarŝanĝe ni aperigas tian tekston, kies originalo estis proponita por traduki en nia lasta (jes, la plej lasta) literatura konkurso *Liro*.

Sanon al la viro sur la glitvojo

“Elverŝu ĝin!”

“Sed, aŭskultu, Kid, ĉu ĝi ne estos tro forta? Viskio kaj alkoholaĵo jam sufiĉe efikas, sed post kiam oni aldonas brandon kaj pipraĵon kaj...”

“Elverŝu. Ĉiel, kiu faras tiun punĉon?” Malamute Kid afable ridetis tra la vapor-nubo. “Kiam vi estos restinta en ĉi tiu lando tiom longe kiom mi restis, filo mia, nutrita de leporaj spuroj kaj salmonaj ventroj, vi scios, ke Kristnasko okazas nur unu fojon jare. Kaj Kristnasko sen punĉo estas same kiel bori truon ĝis la kernroko sen iam ajn trovi vejnon.”

“Ja! donu tion, ‘stos supera”, aprobis Big Jim Belden, kiu venis el sia koncesiejo de Mazy May por pasigi Kristnaskon, kaj kiu, kiel ĉiuj sciis, la du pasintajn monatojn nutris sin nur per alkaĵo. “Ĉu vi mem’ras tjun alk’holaĵon, kjun ni faris ĉe Tanana rivero? Ĉu?”

“Certe jes. Nu, knaboj, domaĝe, ke vi ne vidis la tutan grupon ebria, kvazaŭ dancantaj ursoj, kaj ĉio tio pro bona fermentado de sukero kaj panfermento. Tio okazis antaŭ via alveno”, Malamute Kid diris turnante sin al Stanley Prince, juna minfakulo, kiu alvenis antaŭ du jaroj. “Neniu blankulino estis en la lando tiam, kaj Mason volis edziĝi. La patro de Ruth estis la ĉefo de la Tanananoj, kaj li ne konsentis, same kiel la cetero de la tribo. Ĉu tro forta? Nu, mi uzis mian lastan funton da sukero, tiurilate mi neniam tiel bone sukcesis en mia tuta vivo. Hej, vi devus vidi tiun postkuron laŭ la rivero kaj ĉe la kanuportado!”

“Kio pri la squaw?” demandis Louis Savoy, altstatura franc-kanadano, interesiganta. Ĉar li aŭdis pri tiu frenezajo, kiam li estis en Forty Miles la pasintan vintron.

Tiam Malamute Kid, kiu estis senkompara rakontisto, diris senorname la historion de tiu Lochinvar² de Nordlando. Aŭskultante lin, pli ol unu kruda aventuristo de Nordlando sentis sian koron premiĝanta kaj fortan deziron pri la sunplenaj paŝtejoj de la Sudo, kie la vivo promesas esti io alia ol nura lukto kontraŭ malvarmo kaj morto.

“Ni transiris Jukonon tuj post la unua glacirompiĝo”, li konkludis, “kaj la tribo venis nur kvaronhoron poste. Sed tio savis nin, ĉar rompiĝis la monta glacibaro kaj blokis ilin. Kiam ili fine alvenis en Nuklukyeto la tuta kontoro estis preta por akcepti ilin. Kaj pri la nupto, demandu al Patro Roubeau, ĉi tie, li celebris la solenon.”

La jezuito elbuŝigis sian pipon, sed povis nur patreце rideti, dum protestantoj kaj katolikoj vigle aplaudis.

“Je Dio!” ekkriis Louis Savoy, kiu ŝajnis esti superŝutita de la idilieco. “La petite squaw. Mon Mason brav³. Je Dio!”

Kiam la unuaj glasoj da punĉo estis disdonataj, Bettles la Nesatigebla stariĝis kaj ekkantis sian ŝatatan drinkokanzonon:

Ej! Patro Harry Ward Beecher,
Kaj lerneĵanoj dimanĉaj,
Faras sasafrasdekokton
Tamen prave mi ja vetas
Ke ĝia nomo ja estas
Suko de malpermesita frukto
Ho! Suko de malpermesita frukto.

La bakĥana koruso rekantis:

Ho! suko de malpermesita frukto
Tamen prave mi ja vetas
Ke ĝia nomo ja estas
Suko de malpermesita frukto.

La terura dekoktaĵo de Malamute Kid jam efikis: tiuj viroj el kampadejoj kaj vojoj malstreĉiĝis pro ĝia agrabla varmo, kaj ŝercoj, kantoj kaj rakontoj ĉirkaŭiris la tablon. Fremduloj el dekduo da landoj, ĉiu kaj ĉiuj kune tostis. Jen la anglo Prince, kiu tostis “Onĉjon Sam la malavaran filon de la nova mondo”, kaj la usonano Bettles trinkis je la sano de “la reĝino, Dio benu ŝin”, dum Savoy kaj Meyers, la germana komercisto, trinkis je Alzaco kaj Loreno.

Tiam Malamute Kid, kun glaso en mano, stariĝis kaj rigardis al la fenestro el grasisa papero, sur kiu troviĝis tricoldika glacitavolo. “Sanon al la viro sur la glitvojo ĉi-nokte. Lia nutraĵo estu sufiĉa, liaj hundoj restu viglaj, liaj alumetoj neniam difektiĝu!”

Klak!

Klak!

Aŭdeblis la kutima muziko de hundvipoj, la ĝemaj hurloj de la malamutoj⁴ kaj la skrapado de sledo, kiu haltas ĉe la kabano. Ilia konversacio estingiĝis, kaj ili atendis la sekvon.

Ĝi estas demonstra versio de la 76-paĝa januara *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Mozaiko



La redakcio de “La Ondo de Esperanto”
gratulas ĉiujn kunlaborantojn kaj legantojn
okaze de la Kristnaska kaj Novjara festoj!
Ni esperas, ke vi restos kun ni ankaŭ en la
2019a jaro, kiu portu al vi ĉion plej bonan!

Valentin Melnikov

Pisemismo

Ne indas frapi ĉe ŝlosita pordo –
neniu vin atendas por alven'.
Kaj ĉion, kion tu ŝis vi laŭ ordo –
alia nepre fuŝos sen kompren'.

Se ion kreis vi, pri io revis –
alia baldaŭ igos krevi ĝin.
inspiron, kiun iam vi ricevis –
elspiros iu (eble iu in').

Objektoj kaj aferoj, kiuj plaĉas
al vi – ne estas samaj por fremdul'.
Por li, verŝajne, ili pleje aĉas,
plejbonokaze – simple estas nul'.

Pro tio povas vin obsedi tristo.
Ignoru tamen, kaj ne veu tro.
Kaj se vin oni nomas pesimisto –
"Mi sentas pisemison" diru do.



Spritaj splitoj kaj preskeraroj

El la kolekto de reduktoro

Ne pala ĉirkaŭvolvo

Vindindaĵoj en Katmanduo (Flugfolio de 13a Internacia Himalaja Renkontiĝo, 2019)

Ortodokse sed nigraŭvide

... mi aŭdis jam multege da diveraj ideoj, sed neniam tiel pesimisman kiel la via. (Jolanta van Holstein, <https://www.liberafolio.org/2018/12/04/kien-malaperis-la-unua-libro/#comment-2548>)

Kongesto de eventoj

Dum kongeso, en kiu tiom da aferoj logas kaj distras, estas malfacile atenti la horloĝon! (Karina Oliveira kaj Hanso Becklin: Raporto pri IJK en Badaĥozo // Kontakto, 2018, №5, p. 23)

Propoĉoj atendataj

Realigo de aprobata projekto kadre de Eŭropaj fondadoj, se iu el niaj proponoj estos akceptita, aŭ projekto en kiu EEU estas nur partnero. (Laborplano de EEU por 2019 // Eŭropa Bulteno, 2018, №186, p. 1.)

Knedu ĝin, gesinjoroj!

Eblas partopreni nur la ekskursojn en Jordanio je kosto taksata nun je 300 eŭroj, sed dependa de la nombro de pastoprenontoj. (https://uea.org/vikio/Ghenerale_pri_la_kunveno_en_Akabo; trovis Pascal Dubourg)

Mortintoj vekataj

Memorigu ĉiujn viktimojn de atombombardadoj (<https://www.vrede.be/nieuws/memorigu-ciujn-viktimojn-de-atombombardadoj>)

Translima misvojado

Fine de la prezento de Ĉeĥa Esperanto-Movado mi nomu la ĉeĥajn reprezentantojn en internaciaj Esperaranto organizaĵoj. (Petro Chrdle: La nuna Esperanto movado en Ĉeĥio // Eŭropa Bulteno, oktobro 2010, p. 3.)

Injuritaj badipartoj

... eblis Carbery reveni hejmen, kun vundoj en la skalpo, ĉesto, abdomeno kaj kruro... (<https://ursejo.wordpress.com/2018/07/09/kanada-arbargardisto-postvivas-atakon-de-griza-ursino-defendante-idojn/>)

Dupersona mondmilito

Humphrey Tonkin komparas la du transvivintojn, partoprenintojn de la Unua Mondmilito – Tivadar Soros kaj Julio Baghy... (Halina Gorecka: Beletra Almanako, 2018, №31 // La Ondo de Esperanto, 2018, №10, p. 58)

Plukis **István Ertl**

Se en via lando estas peranto de *La Ondo de Esperanto*, pagu al tiu en via landa valuto. Ni havas perantojn en pluraj landoj. Vidu la liston de la perantoj ĉi-sube.

Se vi havas konton ĉe UEA, sendu ĝirilon por 15 eŭroj al la Centra Oficejo de UEA (Roterdamo), kopie al nia redakcia adreso rete (sezonoj@kanet.ru) aŭ poŝte (RU-236039 Kaliningrad, ab. ja. 1205, Ruslando – Россия). Nia UEA-konto “avko-u”.

Vi povas uzi la internacian monpagan sistemon PayPal, vidu pli en <http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Ruslandanoj pagu 850 rublojn al Галина Романовна Горецкая poŝte (RU-236039, Калининград, аб. ящик 1205), banke (petu informojn pri la kontonumero). Ni akceptas pagojn ankaŭ per Яндекс.Деньги (konto 4100138523456, informu retpoŝte pri la pagonumero), vidu pli en <http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>.

Perantoj de *La Ondo de Esperanto*

Argentino: Roberto Sartor, Saenz Peña 3912, B° La Capilla — 52, CP 5507 — Vistalba, Luján de Cuyo Mendoza. Rete: rosar@fibertel.com.ar.

Aŭstralio: Libroservo de AEA, Esperanto-domo, 143 Lawson St., Redfern N.S.W. 2016. Rete: libroservo@ans.com.au.

Aŭstrio: Leopold Patek, Martinstr. 104/38, AT-3400 Klosterneuburg. Rete: aon.913548977@aon.at.

Belgio: Flandra Esperanto-Ligo, Lange Beeldekensstraat 169, BE-2060 Antwerpen. Rete: retbutiko@fel.esperanto.be.

Brazilo: Brazila Esperanto-Ligo, SDS Ed. Venâncio III Sala 303, BR-70393-902 Brasília-DF. Rete: bel@esperanto.org.br.

Britio: EAB/Viv O'Dunne, Esperanto House, Station Road, Barlaston, Stoke-on-Trent ST12 9DE. Rete: eab@esperanto.org.uk

Bulgario: Georgi Mihalkov, «Nadeŝda» V, bl. 529, vh A et 9 ap 33, BG-1229 Sofia. Rete: modest@abv.bg.

Ĉeĥio: Pavel Polnický, Lidická 939/11, CZ-29001 Poděbrady III. Rete: Cea.polnicky@quick.cz.

Ĉinio: Trezoro Huang Yinbao, Esperanto-Centro, Jinqiao Touzi Gongsi, Jingchuan-Xian Nonglin-lu, Pingliang Gansu, CN-744300. Rete: agrikulturo@126.com.

Danlando: Arne Casper, Bryggervangen 70, 4, tv. DK-2100 København Ø. Rete: arne-casper@email.dk.

Estonio: Ahto Siimson, Kastani väikekoht 12-11, Paikuse, Pärnu maakond, EE-86602. Rete: ahto.siimson@esperanto.ee.

Finnlando: EAF / Paula Niinikorpi, Siltasaarekatu 15 C 65, FI-00530, Helsinki. Rete: paula.niinikorpi@gmail.com.

Francio: Espéranto-France, 4 bis rue de la Cerisaie, FR-75004 Paris. Rete: info@esperanto-france.org.

Germanio: Wolfgang Schwanzer, Pfarrer-Seeger-Strasse 9, DE-55129 Mainz. Rete: abono@esperanto-buecher.de.

Hispanio: Pedro A. Garrote, C/Las Mercedes, 5-5°-C ES-47006 Valladolid. Rete: hisperanto.uea@terra.com.

Hungario: Esperanto-Centro Eventoj, Leiningen u. 4, HU-1193 Budapest. Rete: szilvasi@eszperanto.hu.

Hungario: Hungaria Esperanto-Asocio, HU-1146 Budapest, Thököly út 58-60. Rete: hungario@gmail.com.

Irlando: Joy Davies, 9 Templeogue Wood, Dublin 6W. Rete: noviresp@eircom.net.

Islando: Islanda Esperanto-Asocio, p. k. 1081, IS-121 Reykjavík. Rete: esperant@ismennt.is.

Italio: Itala Esperanto-Federacio, Via Villoresi 38, IT-20143 Milano. Rete: f-esp-it@libero.it.

Japanio: Japana Esperanto-Instituto, Sinzyuku-ku Waseda-mati 12-3, Tōkyō-to 162-0042. Rete: esperanto@jei.or.jp.

Katalunio: Kataluna Esperanto-Asocio, Apartat 1008 E-08204 Sabadell, Katalunio. Rete: v.sole@esperanto.cat.

Koreio: KEA, 1601 Kang Byeon Hanshin Core, 350 Mapo-dong, Mapo-ku, Seoul-121-703. Rete: kea@esperanto.or.kr.

Kroatio: Marija Belošević, Sveti Duh 130, HR-10000 Zagreb. Rete: mbelosev@public.carnet.hr.

Latvio: Margarita Želve, Rūpniecības 35-13, LV-1045 Rīga. Rete: margarita.zelve@gmail.com.

Litovio: Litova Esperanto-Asocio, p. k 167, LT-3000 Kaunas-C. Rete: litova.ea@mail.lt.

Meksiko: Mallely y/o Magdalena Martínez Mateos Av. 523, No.187, 1a Sección de San Juan de Aragón, Del. Gustavo A. Madero, México D.F., CP 07969, México. Rete: ondo@esperanto-mexico.org.

Nederlando: Univerala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam. Rete: ionel@co.uea.org.

Norvegio: Anne Karin Bondhus, Morenefaret 8 A, NO-4340 Bryne. Rete: akbondhus@jkn.no.

Nov-Zelando: David Ryan, PO Box 3867, Wellington, NZ-6140. Rete: ryangomez@xtra.co.nz.

Pollando: Pola Esperanto-Asocio, ul. Andersa 37/59a, PL-00-159 Warszawa. Rete: sekretario@esperanto.pl.

Ruslando: Галина Романовна Горещкая, 236039, Калининград, аб. ящик 1205. Rete: sezonoj@kanet.ru.

Serbio: Miomirka Kovačević, Španskih boraca 32, RS-11070 Novi Beograd. Rete: miomirka.kovacevic@gmail.com.

Slovakio: Stano Marček, Zvolenská 15, SK-03601 Martin. Rete: revuo@stonline.sk.

Ĝi estas demonstra versio de la 76-paĝa januara Ondo. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn. Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>